489 PREFECTURE D'ALGER
DEPOT LÉGAL

1re Année — Mardi 20 Juin 1905 — N° 9

5 Centimes — 5 Centimoj

LA ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

Al niaj Abonantoj

Ni sciigas niajn francajn kaj fremdajn abonantojn, ke nia ĵurnalo eliros nur unufoje dum la someraj monatoj julio, aŭgusto kaj septembro.

Ni petas niajn legantojn senkulpigi nin pro la dirita neelirado, kiu okazos dum la varmaj someraj monatoj, kiuj oni deziras travivi kun i m da kvieteco kaj trankvileco. Ni do eliros la 20-an dum tiu tjri monatoj.

Ni same petas niaj kunfratojn sciigi tion al siaj legantoj.

LA DIREKCIO.

BONEGA SCIIGO

La Ĝenerala Guberniestro de Alĝerujo favore akceptis la demandojn pri monoferado kaj nun sendas al ni cent kvindek frankojn.

Donante tiun helpan monon al la Esperanta Grupo, la Ĝenerala Guberniestro oficiale allasas utilecon de la helpa lingvo kaj ne vidas, kiel kelkaj malamikoj, en ĝia propagando, kontraŭnacian laboron.

Ni estas certaj, ke Esperanto nur plifortiĝos en la pensoj de la personoj kiuj ankoraŭ dubas pri ĝia utileco aŭ tiuj, kiuj ne aliĝas al nia Ideo, pro kelkaj respektindaj konsciencduboj, kaj ni estos pri tio tre dankaj al la Ĝenerala Guberniestro de Alĝerujo.

LA REDAKCIO.

Propono pri la Traduko de Arabaj Vortoj

Mi jam faris multe da tradukoj de historioj kaj priskriboj de araba lando, kaj mi ofte kreis vortojn por esprimi la ideojn tute landlokajn, tiuj ĉi vortoj ne estantaj en niaj vortaroj, krom ia teknika priokupo konstruitaj. Nu, ĝi ekzistas iom da arabaj vortoj, netradukeblaj en la naciaj lingvoj, ĉar ili forlasus la ecojn kaj specialecojn, nur esprimataj per komunaj vortoj, sed ili ne ankoraŭ ekzistas en la vortaro aprobita.

Pri tio, mi ne estas novulo. Jam, mi kunlaboradis pri la teknika mara vortaro, farita de S-ro Rollet de l'Isle, ĉefingeniero de la ŝiparo ; mi do pensis, ke la alĝeraj esperantistoj faru saman laboron.

La oficiala organo de Esperanto en arablingvaj landoj, la « Alĝeria Stelo », estas bonege montrita por helpi al tiu ĉi verko.

KIEL FARI TIUN LABORON ? Ĉiuj personoj kiuj interesas pri tio, sendos la francajn vortojn (aŭ en la naciaj lingvoj, se ili estas fremdulo) kun la traduko en Esperanto. Oni povos kaj eĉ devos doni la tialojn de elekto Unue, tiuj vortoj estos france presitaj kaj poste ĵurnalo donos solvojn akceptontajn de la arablingvistoj, kiuj aprobos aŭ malaprobos. Fine, oni sendos ĉiom al doktoro Zamenhof por ke li akceptu kaj aprobu.

E. DE ROCHAMBEAU.

ÉCHOS

En Songo.

Comme suite à notre écho du 5 juin sur la charmante conférence dialoguée de M. Cart « Une Heure d'Esperanto », signalons le joli poème « En Songo », paroles de Zamenhof, musique de M. Rigoir, chanté par l'étrangère de la saynète. (Vendu o fr. 60 seulement franco, paroles et musique, au profit des aveugles. Chez M. Rigoir, 20, rue des Ormes, Charenton, France).

* * *

Konstantino.

Nia fervora propagandisto, S-ro Baissac, ricevis de siaj lernantoj, belegan « ministra » skribotablon, oferitan kovritan da ĉampanvinaj boteloj. Nia amiko multe penadis, sed li estas rekompencita de l' dankeco de siaj lernantoj. Gratuloj al ambaŭ.

* * *

Gefratoro Esperantista.

La unuan numeron de « Gefratoro Esperantista » ni ricevis el Italujo.

Ni frate salutas tiun novan esperantan gazeton, kaj deziras plenan sukceson je ĝiaj kuraĝaj fondistoj, kiuj estas Johano Cacciapuoti kaj Rafaelo Bagnulo.

La supredirita gazeto eliras en Napolo, kaj ĝiaj kostabonoj estas : en Italujo, 2 fraŭkoj ; eksterlandoj, 4 frankoj.

La abonpagojn kaj ĉion, kio rilatas al ĵurnalo oni devas sendi al S-ro Rafaelo Bagnulo, advokato, Largo Gesù e Maria, n° 4, Napolo (Italujo).

* * *

EĤOJ

Ruslanda Esperantisto.

Ni ricevis ankaŭ la unuan numeron de « Ruslanda Esperantisto », nova rusa gazeto, tre bone presata kaj redakta de doktoro A. I. Asnes, en Peterburgo.

Tutkore ni deziras al nia nova kunfrato plenan sukceson. Ni gratulas ankaŭ la Societo Espero pri ĝia sukceso publikigi Esperantan gazeton en Rusujo, kie, ŝajne, tio estas afero tre malfacila.

* * *

Esperantaj ŝlosiloj.

S-ro Ĉefeĉ, el Londono, sendas al ni du esperantajn ŝlosilojn, anglan kaj germanan, kiuj estas pli efika rimedo por interesi homojn pri nia afero... Bedaŭrinde, ni ricevis nur la anglan kaj germanan ŝlosilojn. La franca, eble, estis forgesita... aŭ ne estas ankoraŭ preta. Ni nenion scias pri tio.

* * *

Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer.

La Esperantista Grupo de Boulogne-sur-Mer, organizos por tiu kongreso Balon kaj Koncertojn esperantistajn. La Komitato insistas por ke, kiel eble plej multaj el la gekongresantoj skribu al ĝi post ne longe, promesante alveni al tiu balo kun naciaj regionaj kaj variaj kostumoj. La koncertoj estos, komprenebble, nur esperantistaj, kaj la Komitato petas ĉiuj, kiuj povas kanti, deklami aŭ muziki, ke ili bonvolu sin turni, por sciigoj al S-ro Paul Boulet, vicsekretario de la Esperanta Grupo de Boulogne-sur-Mer, 49, strato Louis-Duflos.

ESPERO.

Amuzaĵoj

KVINA PROBLEMO

Mia unua estas pronomo.
Mia dua prefikso.
Mia tuto dorsa elkreskaĵo.

SESA PROBLEMO

Kvarlitera vorto mi estas malnova muzikilo.

Sanĝu kvin fojoj mian trian literon vi ricevos :

Antaŭan eksteraĵon de l' buŝo.
Punkton kie kuniĝas landoj, teritorioj, k. t. p.
Unuigon, societon, anaron.
Ripozilon.
Tekseblan kreskaĵon.

SEPA PROBLEMO

El la sekvantaj literoj faru la jenajn vortojn :

A A A A A A
B C D D I
I L L M
O O O
O T
T

Faro per kio oni defendas sin kaj atakas l' aliajn.
Maldolĉa, pika fermentito.
Ĉiama sento de l' timulo.
Daŭro.
Artikolo.
Gramatika finiĝo.
Ĉiun vorton oni povas legi horizontale kaj verticale.

Ni donos la solvojn en nia proksima numero.

A. BAISSAC.

TIMGAD

SEKVO

La laboroj daŭrigitaj dum la lastaj monatoj de 1901 estas kaŭzintaj rimarkindajn eltrovojn: « Tute komence la fosoj elterigis belegan romanan domon, vastan kiel palaco, kaj kies plejmulto da ornamaĵoj, ekzemple kolonoj, peristiloj, mozaikoj, kaj internaj aranĝoj kaj organizajoj estas retrovitaj.

En tiu domo estis tri « atrium », tiom da peristiloj, ses eksteraj kolonaroj (portikoj), kelkaj vestibloj, privataj varmbanejoj, belega fiŝrezervejo sub marmora fontano, kaj vasta ŝtona pelvego ĉirkaŭita per kolonoj. »


. . . . . .



LA VARMBANEJOJ

Eltrovaĵo ankoraŭ pli grava estas surskribaĵo kopiita sur la piedestalo de statuo de Higia, starigita en la « balineum » de la riĉegeca domo malkovrita tiun ĉi jaron. Sur ĝi oni legas sur tiu ĉi soklo: « A Hygie Auguste, Faustus et Valentina. »

Tiu surskribo, enhavanta nur la antaŭnomojn de tiuj, kiuj starigis la statuon, permesis al la distinginda direktoro de la fosadoj certigi, ke la « balineum » estis apartenaĵo de la apuda domo, kaj ke tiu domo, simila je palaco, estis tiu de ekskomandanto de la helpaj kohortoj, « flamino » de Timgad, nomita Sertius. La lukso de tiu loĝejo kaj ankaŭ la vendejo donita de ili atestas la riĉecon de tiu ĉi personaĵo kaj de lia edzino, Valentina Tucciana. La donaco estis princinda; pavimegigita vojo kondukis al tiu vendejo, oni penetris, per portiko, en galerion uzatan kiel promenejo.



LA TEATRO

L' « area » estis ĉirkaŭita de peristilo kun absido portanta kupolon ŝirmantan butikojn. Statuoj estis starigitaj al la gedonatuloj kaj iliaj nomoj estis gravuritaj en la konstruaĵon.

. . . . . .

(Daŭrigota). Traduko de Esperantisto.

★ NIA ALĜERIA PAĜO ★

Alĝeriaj Skizoj.

LA JASMENVENDISTO

Meze de la strateto, tute banata per malvarmeta ombro, jen estas supreniranta, la maljuna vendisto de jasmeno. Li paŝas tre malrapide sur la pintaj pavimoj, kaj lia krio ŝajnas kvazaŭ malproksima delikata plendo en la silento de la Kasba'o. Efektive, tio estas da ĝi trankvila angulo, je l' tre malnova kaj ĉarma alilandeco. La lignaj skulptitaj tegmentetoj estas vermemangitaj. Super la mallarĝa kaj malrekta strateto, la etaĝoj antaŭeniras subtenataj de arĥitekturo ŝanceliĝanta el videblaj torditaj trabetoj, sub la flavaj restaĵoj de stukaĵo, kiu defektiĝas

La domoj estas protektataj de mano, kiu etendiĝas sur la pordo malalta, mistera kaj masiva.. Oni vidas nur mallarĝan spacon da klara ĉielo, kaj, el la muroj preskaŭ senfenestraj, falas la enuo. Arabo, kun blua kitelo kaj ŝeŝia (araba kapvesto ruĝa), havanta sur la maldekstra ŝultro tre dikan kruĉegon flankrondiĝantan ei multiĝiba kupro ; pro la eksaltoj faratai de l' portanto, kelkfoje flue as gutoj da akvo ĝis la kvadratoj de la ruĝa naztuko ŝirmanta la kolon .... Kato nigra timigita forkuras sen bruo...

« Jamen ! Jasmen ! » La maljunulo, mantremanta, antaŭeniras pene ; sed subite, arĝenta voĉo de knabineto lin vokas. Suna radieto brilegas sur la mozaikoj blankaj kaj verdaj enkadrigantaj la muŝarabi'on (araba fenestro) kie malantaŭ de la retaĵo, ridetas Mieka al la mizerulo. Ŝi demandas lin, kial li alvenas tiel malfrue tiun ĉi matenon. De longe ŝi subatendis lin pasontan! Kaj ŝia frunto, kiu steligas la malgrandeta tatuaĵo el blua floreto, aminde malrektiĝas kaj ŝiaj lipoj skizas grimaceton Ŝi parolas al li kun gestoj de amuziĝa ridindeta katido, ŝi antaŭenigas ŝiajn manojn, kun ruĝaj ungoj, embarasataj per manringoj iom bruetantaj ; fine, ŝi prenas la longan, tre longan kolringon el blankaj floroj, onigita de la oro de tri mimozaj buletoj Tiam, kviete, Mieka ĝin altiras, kaj malantaŭe la muroj oni aŭdas ŝian ri 'on.....

En la mezlumo malgrandigita de la fermata ĉambro — kie malnovaj silkaj ŝtofoj havas paletajn senkoloriĝojn, iom malgajaj kaj multe afektas de krepusko — la knabineto sterniĝas kaj spiras la jasmenan bonodoron, volupte, la okuloj fermitaj ; per siaj manetoj ŝi ĝin levas kaj flaras ; poste, ŝi malligas la fadenon kiu ĝin unuigas, kaj sur ŝian gorĝeton, kvazaŭ odora neĝo, falas ĉiuj jasmenoj. Ilia peza bonodoro malrapide ŝin ebriigas, kaj en sonĝo kiu ridetigas, ŝi kredas revidi la landon, kiun oni devigis ŝin forlasi por veni loĝi en tiun urbon, kie ŝi ennuiĝas. Ŝi estis tiel feliĉa ludi apud la floraj plektbariloj, proksime de la dometo al sonĝa arĥitekturo, kiun ŝi revidas — ĝi ŝajnis tute marmora kaj konstruita el rozaj perloj — en la sunkuŝiĝo. Kiel tio estis beleta, Tlemcen'o, kaj la grandaj ĝardenoj, kie krietis la paserojn, kiuj beketis ĉerizojn.....

Tre longatempe, la knabineto ŝvenanta, ebriiĝas kun la bonodro de la floroj, kaj en ilia animo, kiun ŝi enspiras ĉiutage, Mieka retrovas tion, kion ŝi amas.....

Ci, kiu alportas, kun parfumojn, la sonĝon de iluzio, estu benata, malriĉa almozulo !... .

Sub la malluma arkaĵo, reekrianta lian plendon, kiun li kantas, jen estas malaperanta la maljuna jasmenvendisto... .

(El la « Nordafrika Revuo »).

RENÉ DAUMAZAN. Esperantigita de LUDOVIKO LANDES.

RECHERCHES dans tous les pays de généalogies, documents historiques et biographiques, titres nobiliaires, armoiries. ordres de chevalerie, distinctions, etc. *Informations*, **C. MULKAY**, 16, rue des Minimes, *Bruxelles* (Belgique). Reçoit sans frais commons, annonces, abonnements à *La Alĝeria Stelo*.

L'INSIGNE espérantiste Etoile Verte d'Emile GASSE INTERNATIONAL est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**

Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

M. Michel Lledo Tirage 5000